

BOHEMA ESPERANTISTO 11

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření esperanta a esperantismu mezi Čechy.
Orgán „SVAZU ČESKÝCH ESPERANTISTŮ“ v Rakousku.

Redakce a administrace: Praha III, Kampa 495.

Redaktor:

H. K. Bouška,
Praha-Smíchov 1097.

Vydavatel:

Jan Iglauer,
Praha III, Hroznová 6.



ROČNÍK IV

SEŠIT 1

Články. — Artikoloj.

Jos. Krumpholtz: *Význam esperanta pro Čechy a Slováky.* — Joseph Eydel-
nanth: *Antisemitismo kaj progreso.* — Rl. Niall: *La nokto en la Granda morta*
ĥoro de Aŭstralio.

Raportoj kaj notizoj.

Deklaro de »Bohema asocio esperantista« pri la kongreso de B. U. E. Unua
jaro de »Bohema asocio esperantista«.

Kronika a komentář.

Tvůrce esperanta španělským šlechticem. Rumunská královna a esperanto.
Esperanto na mezinárodních sjezdech. Oficiální kursy esperanta v Londýně.
Vyučování esperanta na českých školách. Rozmanitosti z esperantského hnutí.
České přednášky o esperantu. Veřejné kursy esperanta pro Čechy. Esper-
antský večírek ve Vítkovicích.

Informace a dokumenty.

Esperantské knihy českých autorů. O zkouškách z esperanta.

Zprávy spolkové. — Libroj kaj gazetoj.

PRAHA, 31. X. 09.

Cena 36 h

Vychází 20. dne v měsíci a je zdarma zasílán všem členům »Svazu českých
esperantistů«, kteří zaplatili celoroční příspěvek 5 K. — Rukopisy, dopisy,
knihy a časopisy zasílají se redakci. — Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li
přiložena známka na odpověď. — Všecka díla redakci zasláná jsou oznamována.
Reklamace přijímá administrace jen do vyjití následujícího čísla. — Před-
plácti a po číslech odebíratí lze u administrace a ve všech knihkupectvích.

Celoroční předplatné 4 K,

pro členy spolků sdružených ve »Svazu Č. E.« 3 K, jednotlivá čísla po 36 h.

Zásilky pro »S. č. e.« adresujte: Dr. Schmidt, Praha-II. 1036/XIV.

Kdo ukázkové číslo během 8 dnů nevrátí, považován jest za odběratele.

700.010-B

Ĉeský esperantista-Bohema esperantisto

(Red. kaj adm: Praha III, Kampa 495, Bohemujo-Aŭstrio; Jarabono Sm 170) monata revuo por propagando de esperanto kaj esperantismo inter Bohemoj, oficiala organo de „**Bohema asocio esperantista**“ (Svaz českých esperantistů), eliras regule la 20-an de ĉiu monato en kajeroj almenaŭ 16-paĝaj enhavante krom bohemaj informaj artikoloj multajn esperantajn, originalajn kaj tradukitajn, amuzajn kaj klerigajn artikolojn kaj notizojn pri temoj aktualaj kaj internaciaj.

La manuskriptoj, leteroj, libroj kaj gazetoj estu sendataj al la redakcio, la abonpago al la administracio. Ĉiuj verkoj en kiu ajn lingvo ricevitaj de la redakcio estas registrataj; recenzoj estas publikigataj pri la verkoj ricevitaj almenaŭ en du ekzempleroj. La redakcio rezervas al si la rajton korekti la manuskriptojn. Represo kaj traduko, se ili ne estas speciale rezervitaj, estas permesataj, se oni citas nian revuon kaj sendas 3 ekzemplerojn al la redakcio. La redakcio respondas la leterojn sole per la gazeto, ne per la poŝto; kiu bezonas rapidan respondon letere, aldonu poŝtmarkon.

Sdĉleni redakce. — Komunikoj de la redakcio.

S-o Davidov. La 4a n-o de »L. F.« ne eliris ankoraŭ; se ĝi eliros, mi ĝin tuj sendos al vi. — *S-o Neužil.* Dankon pro sciigoj. La petatan kritikon ni sendos, sed bonvolu iom atendi; nun mankas al ni tempo.

Doŝlé publikace. Ĉiŝtĉnĉní vody pro zásobování měst (Inž. Zd. Šima) vyd. prof. Alex. Batěk v Plzni za 12 h. — Miláček. Román (Ed. de Goncourta) vydává Bohd. Melichar v Hradci Králové jako prvý svazek sbírky »Melicharův výkvĉt svĉtových literatur« (sešit za 18 h). — Pĉehled revuů (Vinohrady, Kollárova 19; 5 K ĉtvrtletně) V, 10, 11, 12. — Volná myšlenka (Vinohrady, Korunní 6; 4 K roĉně): V, 4, 5, 6, 7. — Volná škola V, 4, 5, 6. — Havlíček (1 K roĉ.): II, 10, 11, 12, 13, 14. — Zahradá domáci a školní (Chrušim; 4 K roĉ.) IV, 1, 2, 3. — Mladé Podřipsko (Mĉlník, 8 K roĉ.): V, 29 až 40. — Fides (Carrer de la Era, 4, Vilassar de Mar, Hispanujo; 3 fr. roĉ.) I, 4, 5.

Esperanta korespondado. — Esperantská korrespondence.

Unufoja enpresado de l' anonco kostas 25 sd (60 h) trifoja 63 sd (K 150). Por la abonantoj la unua enpresado estas senpaga, por asocioj ĝi kostas 40 h, resp. 1 K.

Každý předplatitel má právo na jedno bezplatné uveřejnění oznámení. Ĉlenové svazu a v něm sdružených spolků platí 40 h., za trojnás. uveřejnění K 1.—

1. J. Förgensen, Odeise (Darujo), Adamsgade No 50. — 2. Aug. Larsson, Malnō (Svedujo), Skolgatan 37. — 3. A. E. Thomas, Sidi-Bel-Ablés, Algĉrs (Afriko) — 4. J. Chocomeli, Utiel, Valencia (Hispanujo). — 5. Ricardo Sans, Sabadell, Barcelona (Hispanujo), Guevedo 74. — 6. M. Ladrière Le Cateau (Francujo), Rue Pasteur 14. — 7. P. Severin, Bruxelles (Beĝujo), rue des Arches Koekelberg. — 8. F.ino Marguerite Béguin, Le Locle (Svisio), Avenir 18. — 9. C. Merle Hursh, Dixon (Illinois, U. S. A.). — 10. J. G. Baxter, Liverpool Anglujo, Wellfieldroad 29. — London (Anglujo) Mildmay Grove 18. Lia Reĝa Majesto His Royal Highness the Prince of Mayo Ĉiam kaj en ĉiuj lingvoj respondas.

Ke zkouškám z esperanta vítanou pomůckou kandidátům je III. roĉník revue »Ĉeský esperantista«, obsahující množství informací, jichž kandidátí musí nezbytnĉ znáti. Uvádíme jen statĉ: Nemožnost mimovolných zmĉn v esperantu, Organizace praktického užívání esperanta (o »Universala Esperanto-Asocio«, Deklarace o podstatĉ esperantismu, Prohlášení o nestrannosti sjezdů esperantistických, Řád pro mezinárodní kongresy esp., Ideo de J. A. Comenius pri la lingvo universala, Ústřední kancelář esperantistů, Jazykový výbor a akademie esperant., Stálý kongresový výbor esperant., Kongresová pokladna esp., Mezinárodní ústav pro esperanto, Saský ústav pro esperanto, Mezinárodní závod pro propagandu esperanta, Šeková banka esp., Svĉtový esp. svaz lékařů, Užívání esperanta na sjezdech, Vzrůst esp. časopisectva, ĉetné zprávy o pokrocích esperanta (Kronika a komentář), o esp. časopisech a knihách (Libroj kaj gazetoj) atd., atd. V uveřejňování podobných informaĉních statích pokračuje se v roĉ. IV. (hlavnĉ v rubrice »Informace a dokumenty«).

VÝZNAM ESPERANTA PRO ČECHY A SLOVÁKY.

Napsal Jos. Krumpholtz.

Přes 150 let již tomu, co vynikající myslitel francouzský Rousseau vyslovil svůj zvláštní náhled, že nestáváme se tou měrou lepšími, jakou stáváme se osvícenějšími, čili, že osvěta a mravnost nepostupují stejnoměrně.

A je tomu snad dnes jinak — lépe? — Jsou triumfy vzdělanosti ducha, triumfy intelektu, pravdy vědy, zároveň i triumfy ethiky, humanity, svědomitosti, spravedlnosti, lásky, blahovolenosti? — Sestoupil už nebo sestupuje s nebes onen arkadický mír, jejž nám křesťanstvo co rok o vánocích zvěstuje? — Pominul již antagonismus národů, oněměla ústa Mommsenů, Apponyiů a p. apoštolů novobarbarismu?

Žel nám — nikoliv!

Přes všechnu osvícenost ducha není posud lidstvo s dostatek osvíceno o tom, čeho mu je nejvíc třeba — o potřebě solidárnosti, vzájemnosti.

A tak žijeme nejen ve znamení pokroku, ale i — boje, a boj ten zvláště národům malým a nesamostatným je těžkým a stále těžším.

»Zázračnou mocí páry a elektřiny« — napsal už před půl stoletím Fr. Palacký — »dána poměrům světovým nová míra, staré hráze mezi zeměmi a národy mizejí vždy více, všecky čeledi, všecka plemena pokolení lidského sblížily se k sobě, dotýkají a otírají se o sebe vzájemně a samožilové každého rodu náležejí napotom do říše bájek. Tím vzbudila se revnivost mezi národy v míře před tím nikdy neznámé, a roste již a bude vyrůstati čím dále tím více; kdo nepoběží napotom o závod se sousedy svými, zakrsá i zahyne konečně a neuchranně...«

A od doby Palackého situace naše národní nejen se nezlepšila, ale ještě ztížila a stěžuje se ustavičně. Nikdo se nedej klamati a ukonejšiti úspěchy našimi národními. Jsou jen relativní a sotva toliké nebo dokonce větší než úspěchy politických nepřátel našich, zejména Němců.

Také cizí svět a cizí kultura dnes nedoráží na nás méně nežli v době »probuzení« našeho — naopak více a intenzivněji. Není to paradoxon, ale poznání nabyté svědomitým srovnáním nynější naší literatury se starší, praví-li prof. Masaryk, že od r. 1848, od zavedení konstitucionalismu germanisace nás ohrožuje snad více — poněvadž vniterněji — nežli v dobách dřívějších, za císaře Josefa.*)

Ano, došlo tak daleko, že octli jsme se na prahu nové renaissance — renaissance železa a krve Hlásá ji Nietzsche, velebí ji Mommsen, Hakatisté, Apponyi a jak se vůbec jmenují všichni ti apoštolé novodobé kultury, plemenného despotismu národa nad národem.

I nastává otázka, jak my, národové malí a zvláště nesamostatní, jak my Čechové, Slováci atd. atd. udržíme se v boji o život v tom shonu za velikostí, světovostí, mocí, a jen mocí . . . ?

Moderní komunikace, moderní pokroky větších a velkých národů, pokroky jich školství, žurnalistiky a intelektuální organisace vůbec, promyšlený a stále promyšlenější jich postup proti národům ostatním, rozpoutání konkurence na všech stranách: v průmyslu, obchodu, umění atd. atd. — to vše jsou činitelé mocní a — noví, že vůči nim nelze nám přestávat na starém programu našem národním . . . **) Dnes už nestačí nám úsilí o pouhé vymanění se z malosti literární — dnes musíme unikat a uniknout už i malosti své — a to znamená i nesamostatnosti své — hospodářské, sociální, politické a každé jiné. — Toť úkol pokrokové a pokročilé doby naší.

Ale jak unikati a ovšem — uniknouti

Jak jinak, odpovídáme s Palackým, než asociací, solidaritou, vzájemností se státy a národy jinými, především ovšem slovanskými a rakouskými a — osvětou a prací.

»Čas jest« — napsal už Palacký — »aby povzbudil se znova národ náš a orientoval se v duchu věku nového; aby povznesl zrak svůj nad ouzké meze otčiny své, a nepřestáváje býti vlastencem věrným, aby spolu stal se světoobčanem bedlivým a opatrným. Musímeť i my účastniti se v obchodě světovém a kořistiti pro sebe z pokroku všeobecného . . . musíme nastoupiti cesty nové a zotaviti se průmyslem všichni, netoliko fabrikanti kupci a řemeslníci, ale i selští hospodáři učenci a úředníci. . . Nemáme-li zakrsati a octnouti se na mizině, musíme ztroj-

*) Naše Doba VII, 794.

**) Masaryk, Naše Doba VII, 794.

násobiti příčinlivost svou a stavěti se co možná v roveň s jinými národy, kteří podnikavostí svou opanovali kraje světa.«

A jinde praví: »Jen tehdáž ubezpečíme trvale budoucnost svou, když duchem vítěziti a vévoditi budeme v odvěkém zápasu prozřetelností nám uloženém«. »Nepovznese-li však ducha svého a ducha národa našeho k vyšší a ušlechtlejší činnosti nežli jest u sousedů našich, nejen nedobudeme si čestného místa v řadě národů, ale neuhájíme konečně ani přirozeného bytu svého.«

To dobře vystihl i heidelberský prof. Gruber napsav r. 1902, že národové splynou ne mečem — krev mučedníků jednotlivých kmenů nevolá po jednotě — ale láskou vzájemnou.

Avšak vzájemný cit lásky — dokládá prof. Gruber — dostaví se mocněji teprve tehdy, až vyrovnají se národové malí národům velkým, t. j. až předčí je silou duševní a nahradí tak nedostatek síly hmotné silou morální — tedy, až duševně se nejen vyrovnají, ale i vyniknou nad své utiskovatele.*)

Takový je tedy dnes úkol náš národní a tedy i — politický.

Čas jest, abychom se vzpamatovali už i v politice a začali do opravdy politiku svou, českou, t. j. politiku na základě své národní a historické ideje — ideje humanitní, jež stala se základem novodobých tužeb národů, zvláště malých. Jinak nemáme práva nazývati se národem Komenského, Kollára, Palackého... Nebo, co žádá po nás Komenský? »Škola buď dílnou lidskosti!« — A co Kollár? — »Zvoláš-li Slovan, ať se vždy ozve člověk.« — A co Palacký? — »Je nejvyšší a nejsvětější člověka povinnost, býti člověkem.« To je náš náš národní program český, to je program slovenský — program humanitní — toť i program esperantistů — esperantismu. (Pokračování.)



ANTISEMITISMO KAJ PROGRESO.

De Joseph Eydelnanth (Andeville).

Dezirante skribi ion pri antisemitismo por via laŭdinda »Bohema esperantisto«, mi verdire pensas, ke tiu-ĉi tasko estos iom malfacila por mi, ĉar pruvadi ion treege kompren-

*) »Prusko musí silami duševními nahradit, co ztratilo na síle fysické«, zvolal prý král pruský (Fřidrich Vilém) po válkách Napoleonských.

eblan, ekzemple, ke antisemitismo kaj homa progreso estas du aferoj nekunigeblaj, — ĝenerale diri estas laboro malfacila. Okazas ja tre ofte, ke, se oni traktas pri ia tre malklara objekto, la kompreno de tiu-ĉi lasta ne postulas tre grandan spiritan fortecon kaj penon, kaj male, se oni admonas homojn: ne batu vin reciproke, amu vin unu la alian — tion malfeliĉe homoj ankoraŭ ĝis nun ne sukcesis kompreni!

Tamen mi penos klarigi kelkajn miajn pensetojn pri la supre-citita temo per kelkaj vortoj. Unufoje, kiam mi vojaĝis tra la suda Rusujo, mi renkontis iun vilaĝanon, kiu revenis el urbo, kie oni tuje »lernigis« Hebreojn, aŭ parolante pli simple, kie oni mortigadis po mile hebreajn loĝantojn. En la manoj tiu vilaĝano tenis grandegan sakon da diversaj objektoj, kiujn li rabe »kolektis« (laŭ lia diro) en disrompitaj hejmoj de mortigitaj Hebreoj. Mi demandis lin, kial li ŝtelis tiujn-ĉi objektojn kaj mortigis senkulpajn homojn. Ho, tion oni permesis ja fari al ni! Kaj poste, mi devas diri al vi, ke riĉaj Hebreoj, — kiel oni diris al ni en vilaĝo — faras jam tro grandan konkurencon . . . ! !«

Kaj tial — mi ekpensis — oni rabas malriĉajn Hebreojn . . . tre juste . . . !

Mi opinias, ke la vera bazo de antisemitismo troviĝas ĝuste en tio, ke riĉaj Hebreoj faras »konkurecon«, — la homa envio estas bonega ludilo por tiu celo. Kaj sole mankas (vere?) iu lerta fripono por ludi laŭ tiu-ĉi amata melodio »konkurenco« por fari sian malhonestan kaj malhonecan politikon.

Sed ĉu vere ekzistas antisemitismo, tio estas popola amasa malamo al Hebreoj? — Mi ne sole pensas, sed estas eĉ certa, ke ĝi ne ekzistas.

La kristana religio (kaj precipe katolika), kiu diras: »amu vin unu la alian«, preskaŭ la unua montris vojon al la popoloj de ĉiuj nacioj malami hebrean popolon, nudigante tiele sian hipokritecon kaj tute ne dian »devenon«. Ni memoru sole Sanktan Inkvizion, kies turmentoj Hebreoj eble pli ol iu ajn alia popolo sentadis dolorege dum multaj jarcentoj. Sed ni lasu flanke la religion (panaceo kontraŭ febro de ĉiama homa volo scii!), ni parolu pri nuna tempo, kiam la religio estas ĉie analizata kaj ofte subfosata en siaj bazoj. — Kion do propre diri volas antisemidoj de XX-a jarcento? Ĉu ili volas detruĝi sur la tuta tero la tutan hebrean popolon kun ĝia longjara historio kaj tiele »liberigi« homojn de si mem, ĉar se ne ekzistos Hebreoj ne ekzistos ja

ankaŭ antisemidoj? Sed tion ja mi tute ne komprenas: voli detrui ion por detrui sin mem, — tio estas nepra kandidateco al . . . domo por frenezuloj! Aŭ eble antisemidoj volas forpreni de Hebreoj ĉiujn homajn rajtojn, fari ilin kiel siajn sklavojn? Nobla konduto, ĉu ne! Oni devas esti granda fantaziulo por revii pri tio . . . Estas absolute la sama afero, se oni volus nepre, ke Serboj, ekzemple, diru tuj al la homaro: ni ĉesas esti Serboj — germanigu nin kaj detruu senkompaten nian nacian vivon! — Mi ne pensas, ke Serboj diros tiel kaj kontraŭe, mi estas eĉ certa, ke se Germanoj ekvolos perforte germanigi Serbojn, tiuj-ĉi lastaj kontraŭstaros fortege, eĉ je la kosto de sia vivo. Bone konata itala profesoro Cesare Lombroso diras, ke antisemidoj estas nerve-patologiaj tipoj kaj oni devas ilin kuraci tiel same, kiel oni kuras . . . frenezulojn. Laŭ mi ili estas simple homoj ne tute sanaj; ĉu en ilia cerbo, ĉu en ia alia organo io nepre mankas . . .

Oni scias tre bone, laŭ studoj de Darwin kaj liaj multnombraj disciploj, ke disvolviĝado de vivaj estaĵoj (ĉu de besta, ĉu de vegetaĵa regnoj) estas des pli supera kaj longdaŭra, ju pli meze de diversaj specoj la selekcio (elektiĝado) estas intensa. Tiamaniere vivaj estaĵoj povas pli facile kaj pli efike batali kontraŭ siaj naturaj malamikoj kaj tial daŭri vivi kaj perfektigi. Tia sama fenomeno renkontiĝas en vivo de popoloj ankaŭ. Ni tralegu la antikvan historion. Ĉu Fojnikoj, Egiptoj, Grekoj povus esti tiaj, kiaj ili estis, se ili ne intermiksiĝadus ĉiumomente kun aliaj popoloj?

(Daŭrigo.)



LA NOKTO EN LA GRANDA MORTA KORO DE AŬSTRALIO.

Priskribas *Rl. Niall* (Melbourne).

La leviĝo de la luno sur la aŭstralia dezerto. La dua horo matene. Absolute ebena pejzaĝo de griza malbelkreskinta arbetaro kaj ruĝa sablo kuniĝas ĉiufanke sub la palaj lunradioj. Apenaŭ videbla vojo transiras zigzage la aspekton de la silentaj lunlumataj nelogeblaj landoj. Apud tiu ĉi vojo ni observadu dum unu horo la preterpasadon de trimil bovoj el la Nordo en ilia marŝado trans tiu ĉi okdekmejla seka parto.

Aŭskultu!

El la silento de la grandegaj dezertaj landoj venas mallaŭta ĝemanta brueto kvazaŭ vento en arbaro aŭ kvazaŭ

ondegoj sur marbordo limata per ŝtonegoj. Transportata per la malforta nokta venteto venas la malproksima sonorado de ĉevalsonoriloj. Polvo pendas peze super la norda dezerto aspektante palege en la griza lumo de la luno. El la mallumo, sur la vojo rajdisto alproksimiĝas simile fantomon de la dezerto. Li montras la vojon — tiel malgrasa kaj senlaca kiel la hardita ĉevalo, kiun li rajdas.

Post li venas longlinie » la ilarumo « proksimume sepdek eluzitaj ĉevaloj, ĉirkaŭ dekduo da kiuj estas ŝargitaj kaj portas sonorilojn tintige. Alia rajdisto brunigita de la suno kaj vento alkondukas antaŭe ilian postan parton. Tiuj ĉi pasas en la mallumon vojaĝante suden. Spaco da okdek jardoj proksimume — tiam venas la estro de la brutaro — granda malgrasa stangokorna besto kun polvomakulita harplena frunto kaj profunde malleviĝintaj turmentegitaj okuloj. Lia masiva korpo estas malgrasa kaj la grandaj flankoj estas pinĉitaj kaj enmalleviĝintaj.

Soifo! Dum du varmegaj tagoj kaj tri sekigitaj senripozaj noktoj li estas kondukinta la malsategan brutaron tra tiuj ĉi neloĝeblaj landoj ĉiam kun la sono de ĉevalsonoriloj antaŭe. Lia fido estas en tiuj sonoriloj. Ili kondukas al akvo.

Morgaŭ! Post li venas longlinie liaj samspeculoj. Unuope, duope, triope, kvarope ili venas. Terura kaj malgrasa estas ĉiu; kun lacaj mallevigataj okuloj kaj soifopinĉantaj flankoj ili vojaĝas malrapide, sed kun ŝancelema paŝado ĉiam antaŭen trans la senakva regiono.

Ruĝaj, blankaj, ruĝbrunaj, pigkoloraj, fragkoloraj, blankvizaĝaj — ili venas; kaj ili pasas suden en la nokton. Multo pasas kaj tiam venas ombrata rajdisto sur ĉiu flanko, kaj la rajdistoj rajdas simile fantomojn sur la dezerto kvindek paŝojn de la marŝanta brutaro.

Tiuj ĉi ankaŭ pasas en la nokton, sed ankoraŭ ili venas — centoj post centoj, unuope, duope, triope, kvarope marŝante senorde, sed ĝuste sur la vojo, rigardante nek dekstren nek maldekstren, sed vojaĝante malrapide per mezurata paŝego, balancante siajn masivajn kornkronitajn kapojn laŭ la ritmo de sia paŝado tra la maleolprofunda ruĝa sablo. Garlandoj post garlandoj de ruĝgriza polvo disvolviĝas el sub la sennombraj hufoj kaj leviĝas peze kaj malgaje per la trankvila nokta aero por flugportiĝadi fine garlandiĝante malrapide malproksimen super la neloĝeblaj landoj en multegon kaj nulecon preter.

Tempon de l'tempo flanke pasas ombrataj rajdistoj rajdante malrapide kun la brutaro. Ilia afero estas, zorgi, ke

ne okazu breĉo en la trimejlonga procesio de bestaro marŝanta suden trans la neloĝebla lando de arbetaro kaj sablo.

Jam rajdisto vokas rajdiston dum la nokto. Jam ili staras senmove, spionante la brutaron preterpasantan kaj tuj ili turnas sin al la laca marŝado denove rekuraĝigante la bestaron per vokoj, kiujn sole paŝtistoj komprenas.

Rimarku la vastan kaŝitan forton reprezentatan de la marŝado de tiuj ĉi mutaj furiozaj brutoj al akvo! Tio ĉi estas la dezerto! La fantoma mallumo, la grizverda arbetaro, la ruĝgriza sablo, la bruna polvo suprenbukliĝanta en la okulon de la palega luno, la ŝtala lumeto de kornoj, la longa mallarĝa procesio de multekoloraj feloj, la ombrataj formoj de rajdistoj flanke kaj super ĉio la sennuba stelplena ĉielo. Tio ĉi estas la dezerto, la fermo de kies grandegaj makzeloj signifas morton! Jen la laboro de honoj! Obstina persisto estas la esprimo enskribita en la mallevigitaj vitrosimilaj okuloj de viroj kaj bestoj. Grandaj, polvaj, kornkronitaj kapoj balanciĝas kun ritmo laŭ ilia paŝado kaj estas levitaj tempon de l'tempo por respondi iom mallaŭtajn ĝemojn de mordetanta soifo, kiuj pasas simile murmurojn de protesto tra la brutaro aŭ alie, tiuj ĉi kapoj estas levitaj por enflari la apenaŭ moviĝantan noktan aeron kun la espero, ke ĝi alportos la longe atenditan odoron de malproksima akvo.

El la neloĝebla lando kaj la nokto ili venas — forte per centoj, kaj la nokto kaj la senkompataj, senlimaj interspacoj glutas ilin.

Fine venas la postaj bestoj — la malfortuloj kaj la lamuloj. Tiuj ĉi batalas kuraĝe ĝis la fino, sciante plene bone, ke la prokrasto silabas morton kaj ke la ostoj de la malakceluloj blankiĝos apud la vojo. Ili pasas. Tiam du rajdistoj pasas kaj ĉio estas perdita en la mallumo. Sono mortas. La ekmalfortiĝanta luno malvarme ĉasta kaj klara supreniras zeniten kun la venanta tagiĝo kaj morta silento regas en la neloĝeblaj dezertaj landoj denove.



RAPORTOJ KAJ NOTIZOJ.

Deklaro de „Bohema asocio esperantista“ pri la kongreso de B. U. E. »Bohema asocio esperantista« centra unuiĝo de individuoj kaj societoj esperantistaj, energie protestas kontraŭ tio, ke la kongreso aranĝita de la societo »Bohema unio esperantista« (B. U. E.) estu proklamata kaj rigardata kiel manifestacio de la tuta bohema esperantistaro. La kongreso,

kiu okazis sen la partopreno de la esperantistoj kaj esperantistaj societoj unuiĝintaj en »Bohema asocio esperantista« kaj starantaj ekster ambaŭ centroj, Asocio kaj Unio, la kongreso, en kiu kelkaj bohemiaj esperantistoj, eminentaj laborantoj, estis antaŭe eligitaj el la partopreno, certe ne povas esti parolanto de ĉiuj bohemiaj esperantistoj, kiel ĝi estis kaj estas neojale kaj senrajte proklamata. Ni ne volis malutili la kongreson por ne malutili komunan aferon, tial ni donis al la membroj de niaj asocio kaj societoj la liberecon neoficiale kiel rigardantoj partopreni en la kongreso, kaj ni prokrastis nian proteston, sed nun ni ne povas lasi la publikon en la dubo pri tio, ke ni absolute ne volas identigi nin kun la homoj, kiuj estis aranĝantoj kaj parolantoj de tiu kongreso. En Praha la 28. de septembro 1909. *Bohema asocio esperantista.*

O. S.

Rim. La bohema teksto de tiu ĉi deklaro estis legebla en la bohemiaj ĵurnaloj de Praha, Plzeň, Brno, Vídeň.

Rd.

Unua jaro de „Bohema asocio esperantista“. La 27an de septembro 1908 estis fondita »Bohema asocio esperantista«. Kion ĝi faris dum la unua, la plej malfacila, jaro de sia ekzistado detale montris longa raporto de la ĝenerala sekretario en la ĝenerala kunveno de »B. A. E.« (14.X. 09.). Ni ne povas publikigi ĝin laŭvorte kun ĉiuj detalaĵoj, ni publikigas sole ĝian mallongan resumon, tial nia priskribo povas esti sole neplena skizo pri asocia agado. Jen la ĉefaj punktoj: 1. *Propagando de esperanto per preseldonaĵoj.* Por informi la publikon pri la problemo de lingvo internacia ĝenerale kaj esperanto speciale estis fonditaj bohemiaj kolektoj da libroj (Knihovna českých esperantistů — Biblioteko de bohemiaj esperantistoj) kaj flugfolioj (Informační letáky o esperantu — Informaj flugfolioj pri esperanto) pri esperanto. Ĝis nun eliris jenaj verkoj: »Rezonoj pri lingvo internacia« (traduko de la konata artikolo »Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia« bohemiĝita de ges-oj Barvíř, Biskup, Kraus, Krausová, Palek, Hromada, Vaněčkova, Vaníčková), »Lingvo tutslava kaj esperanto« (artikolo de s-o Krumpholtz el »Ĉes. esp.« III), »Kio estas esperanto?« (de Dro Kamaryt) kaj »Disvastiĝo de esperanto« (de H. K. Bouška). Al la membroj estis donacata la revuo »Český esperantista« eldonata de s-o Boháček el Jevíčko. Krom la 2 libroj (po 1.000 ekz.), 2 informaj flugfolioj (po 1.000 ekz.) estis eldonitaj 9 specoj de reklamfolioj (27.270 ekzempleroj), protesto al la ministerio de internaj aferoj (1.000 ekz.) kaj aliaj presaĵoj (5750 ekz.) 2. *Propagando per gazetaro.* Al la redakcioj de bohemiaj ĵurnaloj estis regule sendataj presitaj informoj pri la progresado de esperanto (reprezo de la kroniko el »Ĉes. esp.«); pli ol 300 tiaj sciigoj estis enpresitaj. Al la 50 gazetoj estis sendita flugfolio pri la disvastiĝo de esperanto; represis ĝin 15 gazetoj, Tre multaj gazetoj publikigis la sciigon, ke la asocio donacos al la legantoj senpagan gramatikon de esp.; al la petintoj (518) estis sendita folio »Esperanto sur unu folio«. En la gazetaro la asocio proponis propagandajn paketojn enhavantajn kolekton da propagandaj presaĵoj pri esperanto (à 50 hal.). La bohema gazetaro favore recenzis la eldonaĵojn de B. A. E. kaj kompleze publikigadis ĝiajn informojn. Kontraŭ silentado de »Národní Listy« pri esperanto, sukcese protestis deputacio de B. A. E. (Bouška, Kamaryt). Konstatante tiun ĉi komplezon de bohema gazetaro, oni devas konstati, ke la esperanta gazetaro estis tre malmulte kompleza por publikigado de la raportoj pri la asocio: la resuman kronikon pri esperanta movado inter Bohemoj (publikigata en »Bohema esperantista«) represadis du aŭ tri gazetoj; el pli ol 40 gazetoj ricevintaj sciigojn pri fondo de B. A. E. kaj stato de esperantismo en Bohemujo enpresis ĝin sole — »L'Espérantiste«; el pli ol 80 (okdek!) redakcioj ricevintaj presitajn raportojn

pri esp. movado en Bohemujo kaj preparata kongreso represis ĝin kvar aŭ kvin gazetoj! (Se iu pensus, ke la gazetoj ne havis lokon, mi atentigas pri tio, ke ili kompleze publikigadis longajn, malsaĝajn kaj ofte malverajn sciigojn el Bohemujo). Krom tio la asocioj publikigis vicon da artikoloj en boh. kaj esp. gazetoj. 3. *Propagando per paroladoj kaj kursoj*. Koncerne paroladojn du entreprenoj estas rimarkindaj: la asocio faris (11. X. 1908.) kvar samtempajn parolojn pri esp. en la ĉefaj antaŭurboj de Praha anoncitaj per grandegaj afiŝoj, la plej grandaj, kiujn bohemaj esperantistoj ĝis nun eldonis; la asocio faris la unuajn publikajn (de oficoj permesitajn) parolojn en esperanto (4. IV. 09. en Ml. Boleslav), nome pri internacia kulturo (Dro Kamaryt) kaj pri interna ideo de esperanto (Bouška). Alie la paroloj estis nemultaj, ĉar la asocio (laŭ proklamita principo) faris ilin sole en la lokoj, kie mankis iniciato de loka societo. Paroladoj estis en Praha, Smíchov, Vinohrady, Žižkov, Karlín, Pardubice, Mělník, kurso en Praha (por instruistoj) kaj Mělník. Krom tio la membroj de l'asocio faris multajn parolojn kaj kursojn sen direkta patronado de l'asocio. La komuna kongreso de amikoj de esperantismo, pacifismo kaj libera penso (preparita laŭ la propono de H. Alferi) bedaŭrinde ne efektiviĝis pro tiama milita danĝero. 4. *Agado organiza*. Oni zorgis pri viglaj interrilatoj korespondaj kaj personaj kun provincaj esperantistoj. Komitatanoj persone informiĝis pri la stato de la movado en diversaj lokoj (tiam oni konstatis la malveron en la raportoj de l'alia partio). Al la asocio aliĝis grupoj en Praha (3', Žižkov, Brno, Prostějov, Bystřice, Jevíčko, Vyzovice, Moravec, Vítkovice, Chvalkovice. 5. *Propagando en publikaj institucioj*. La ministerio de instruado estis petita pri nomigo de delegito al la ekzamenoj pri esperanto. De »Národní rada česká« (Nacia konsilantaro bohema) estis elektitaj du asocioj kiel delegitoj por esperanto. Oni gajnis la permeson por oficialaj kursoj en gimnazioj de Kroměříž kaj Mor. Ostrava (instruis s-o Krumpholtz). La asocio partoprenis en la jubilea ekspozicio komerca kaj industria kaj en la naci-ekonomia foiro kaj ekspozicio. 6. *Ekzamenoj pri esperanto*. La ekzamenaj komisionoj de l'asocio ekzamenis 11 kandidatojn, el kiuj ĉiuj sukcesis kaj ricevis la ateston. 7. *Korespondado*. La asocio ricevis 482 leterojn (ne estas enkalkulataj multenombraj mendoj), sendis 1035 leterojn. Jen la resumo de la raporto pri agado de l'asocio dum la unua jaro. Mi ĝin finas per la vortoj de l'raportinto: »Vi vidas, ke ni ne mallaboris. La raporto estis konciza. Mi devis ŝpari la vortojn, ĉar ni ne ŝparis la laboron. Ni volis fari pli multe; ni ne faris, ĉar ĝis nun ni ne povis. Sed ni faros tion, ĉar ni volas kaj povas!«

H. K. Bouška.



KRONIKA A KOMENTÁŘ.

Tvůrce esperanta španělským šlechticem. Při příležitosti pátého mezinárodního sjezdu esperantistů v Barceloně španělský král Alfons XIII, který byl čestným předsedou sjezdu, jmenoval tvůrce esperanta Dra L. L. Zamenhofa komandérem řádu Isabelly II. Katolické. S udělením tohoto (třetího) řádu španělské koruny spojeno je osobní šlechtictví. Je to již druhé čestné vyznamenání tvůrce esperanta vládami evropskými, neboť již r. 1905 jmenován byl Dr. Zamenhof (při příležitosti prvního sjezdu) francouzskou vládou důstojníkem čestné legie.

Hkb.

Rumunská královna a esperanto. Rumunská královna Eliška, známá jako spisovatelka pod pseudonymem Carmen Sylva, je první krá-

lovna, která se naučila esperantu. Je oddanou přítelkyní esperanta. S jejím výslovným svolením vyučuje se esperantu na jejím ústavě slepců. Sama přijala protektorát »Rumunské společnosti esperantistů« (Rumana esperantista societo) a v poslední době (12. srpna 09) dala této společnosti výhradní právo k esperantskému překladu svých spisů. *Hkb.*

